

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 16 * 22. Jan. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Esperanto en Sovjet-Ruslando.

La Vero pri la Rezolucio de la Sovjeta Registaro.

Depost pli ol unu jaro esperantistoj kaj idistoj interdisputis pri la rezolucio de la Sovjeta Registaro, laŭ kiu Esperanto estis enkondukota en la lernejoj de la sovjeta respubliko. Pro la neebleco ricevi el Ruslando fidindajn informojn, estis ankaŭ neeble esplori la pravecon de la pretendoj de l' esperantistoj resp. de l' idistoj. Intertempe la esperantistoj multe reklamis per la rezolucio, dum la idistoj insultis la esperantistojn kiel mensogulojn.

Fine ni sukcesis ricevi aŭtentikan sciigon de litova samideano P. Medem, kiu metas la originalojn je nia dispozono. Laŭ tiu sciigo ambaŭ, esperantistoj kaj idistoj, pravas kaj malpravas. Efektive, la konata rezolucio estas alprenita de la „Sovjeta Komisiono por esploro de la demando pri enkonduko de fakultativa instruo de la lingvo internacia en lernejoj“, sed ĝi ne estas plenumita — pro manko de tempo de la komisionanoj.

Ni jen represas, kion skribis al ni nia litova samideano:

Kovno, la 15. jan. 1921.

Antaŭ du tagoj mi ricevis de samideano veninta el Petrograd du numerojn de „Espero“, oficiala organo de Petrograda Societo „Espero“, de junio kaj aŭgusto 1920.

En la juna numero interalie estas presita interesa artikolo, kies kopion mi ĉi sendas. Krom tio mi aldonas la tradukon de aparta folieto aldona al „Espero“.

En la sama gazeto estas kelkaj vortoj pri la Moskva Domo Esperanto... Ĝi estis transdonita al Moskva Societo Esperantista en novembro 1918. Oni volis en ĝin transloĝigi ĉiujn Moskvajn Esp. Organizaĵojn kaj tiamaniere akiri por Esp. movado fortikan bazon... Nun oni konfesas, ke la esperoj ne efektiviĝis: la Domo restis apenaŭ vivanta, eĉ unu el agemaj moskvanoj nomis ĝin „Mortejo“.

El „Espero“

oficiala organo de Petrograda Societo „Espero“
Junio 1920.

Dum 1919 januaro estis organizita ĉe popola Komisararo de Klerigado, NARKOMPROS¹⁾, speciala komisiono por esplorado de demando pri enkonduko de L. I. en la lernejoj. La komisionon partoprenis kelkaj esperantistoj, unu idisto (d-ro Titov) kaj tri profesoroj. La komisiono dum majo 1919

finis siajn laborojn, aprobis raporton prezentitan de N. P. Evstifeev en la nomo de esperantistoj.

La tezoj aprobitaj estis propagandacele presitaj sur apartaj folietoj²⁾. Plej ageman rolon en la komisiono ludis Evstifeev kaj Titov. La rezultoj de la laboro estis dum majo 1919 prezentitaj al la Fakto de Unueca Instruado (Oidel edinoj školy), kiu transdonis ilin al la Lerneja Sekcio.

La lasta likvidis komisionon, pagis al ĉiu komisionano certan sumon por la laboro kaj al N. P. Evstifeev, kiu tiutempe jam mem oficis en Narkompros, transdonis proponon, adresitan al la membroj de la komisiono, modifi kaj ŝangi la raporton, konforme al la bezonoj de Lerneja Sekcio.

Evstifeev mem pro multaj kaŭzoj ne povis verki la raporton kaj volis transdoni ĝin al d-ro Titov. Sed al tiu lasta ankaŭ pro kaŭzoj malfavoraj kaj de li sendependaj — ekmankis la tempo; kaj... neniu plu el la membroj de la komisiono estis informita pri la decido.

Eĉ Moskva Societo Esperantista nenion sciis. La raportoj restis ne ellaboritaj.

Forpasis duonjaro, kaj verŝajne nun en Narkompros oni eĉ forgesis la anekdoton pri la Komisiono Mondlingva.

Tezoj

akceptitaj en formo de rezolucioj dum la pridiskutado de l' raporto de N. P. Evstifeev, en la Komisiono por esploro de la demando pri enkonduko de fakultativa instruo de la lingvo internacia en lernejoj, en la kunsidoj de la 12., 14 kaj 25. febr. 1919. (En la Lerneja Sekcio de Narkompros.)

(Tie ĉi sekvas 10 paragrafoj, kies presado okupus multe da loko [ĉirkaŭ 3500 literoj]. Tial jen nur la lasta rezolucio:)

En la kunsido la 5-an de marto 1919 la Komisiono, resumante siajn antaŭajn decidojn, konkludas:

1. ke la sola lingvo povanta ludi la rolon de la Lingvo Internacia, estas „Esperanto“ pro kio la Komisiono elektas la lingvon „Esperanto“, kaj
2. ke pro tio la Komisiono trovas necese **senpere** trairi al la demando pri rimedoj por la **praktika** efektiviĝo de la supre citita decido.

La energio de la faleganta akvo estas kelkaj milionoj da ĉevalpovo. Per turbinoj oni utiligas 110 000 ĉevalpovojn, kiuj estas nur malgranda parto de la por ni perdiganta energio de la akvo-falego.

La turbinoj produktas elektran fluon, kiu movas elektrokemiajn fabrikojn kaj lumigas urbojn.

La petrol-, gas- kaj mazut-motoroj estas uzebraj nur, ĝis kiam la kvantoj de la petrolo kaj tergaso daŭros. Sed konsiderante la grandegan kvanton de la gasfontoj kaj petrolfontoj, la per ĉi tiuj movataj motoroj havas firmen estontecon. Ekzemple en Hungario ekzistas gasfonto, kies gasproduktio po tago korespondas je 200 vagonoj da prusa karbo. Gejserojn kaj gasfontojn ni trovas ne nur en Ameriko, sed ankaŭ aliloke. La materio de la gasoj elpentrantaj el la gasfontoj estas plejparte la metano, kiu estas unuaranga purega hejmatiero, precipe taŭga por vitrofabrikejoj.

Mazuto kaj benzino devenas de petrolo. Mazuto estas minerala oleo postrestanta ĉe la distilo de la petrolo. Ili estas bonegaj hejmatieroj.

La ekspansiaj motoroj bezonas eksplodemajn materiojn. Ĉi tiuj motoroj kaj turbinoj jam nun estas seriozaj konkurantoj de la karbomaŝinoj.

La motoroj movataj per la sunlumo estas malmulte konataj, malmulte aplikataj. Tial mi pli vaste ilin priraktos.

Ĉe la ekvatoro la energio de la suno unu kvadratemron falantaj sunradioj dum dekdio horoj estas tri ĉevalpovoj. Do la energio de la sunlumo falanta sur kelke da kvadratkilometroj superas eĉ tiun de la Niagara-akvofalego. Oni jam konstruis sun-

Jen kion raportis al ni s-ro Medem.

Do, la rezolucio fakte estas farita de la komisiono, kaj estas al ni nekomprenebla, ke nia samideano Evstifeev, post kiam li atingis tian gravan sukceson, ne sciis utiligi ĝin. Sed ni ne povas rigardi post la kulisojn de la sovjeta scenejo. Kiu scias, kiajn malhelpaĵojn renkontis niaj samideanoj en Petrograd!

Por ni esperantistoj en aliaj landoj la rezolucio de l' sovjeta komisiono estas, malgraŭ ĝia neefektiviĝo, valora dokumento, kiun ni kontente metas al la aro de la ceteraj oficialaj dokumentoj. El ĝi ni ankaŭ denove vidas la ĝojigan fakton, ke idisto aliĝas al la movado esperantista por ne malhelpi la baldaŭan solvon de la mondlingva demando.

¹⁾ NARKOMPROS estas mallongigita nomo (ruslingve) de la Popola Komisararo de Klerigado. En Esperanto ĝi estus „POPKOMKLER“.

²⁾ La tradukon el rusa lingvo mi ĉi-sube aldonas. (P. M.)

La Konfido je ET

kreskas de semajno al semajno. En la unua duono de januaro alvenis pli ol 100 novaj abonoj. Kvantam tio estas parte ŝuldata al la jarŝango, certe ankaŭ la kreskinta konfido ĉe la samideanoj multe helpis al la pligrandigo de la abonnumero. Nun ET kalkulas 700 pagantajn abonantojn, kaj ĝi jam ne estas malproksima de tiu nombro, kiu estas la aspiro de la plej multaj Esp. gazetoj: la nombro „mil“. Ni esperas atingi tiun ĉi nombron ankoraŭ ĝis la XIII-a Kongreso de Esperanto, kiam nia ĵurnalo elirados regule kaj precize je la fiksita tago kaj kiam per tio la konfido ĉe la samideanoj ĉiam pli grandigos.

Bedaŭrinde la lastaj tri numeroj de ET malfruiĝis je kelkaj tagoj. Ni esperas, ke estonte tie malfruiĝo ne plu okazos; ĉar nun la redaktoro trovis valoran helpilon en sia fratino, kiu de nun prizorgos la ekspedadon.

Ankaŭ ni esperas, ke baldaŭ ni povos kelkfoje efektiviĝi specialan aldonon por Scienco, Arto kaj Literaturo, ĉar multaj legantoj de ET tion deziras.

Kaj nun ni petas niajn amikojn ne laciĝi en la varbado de novaj abonantoj. Kiam la abonoj estos atingintaj la nombron 800, ni denove komunikos pri ili.

Kio anstatauos la karbon?

Dum la lastaj tempoj la kvanto de la karbo en la diversaj minejoj ire malgrandiĝis. La kaŭzo de tio ĉi estas la mirinda progreso de la moderna tekniko — la grandegaj vapormaŝinoj deziras multe da karbo! Kaj ankaŭ la mondmito! Oni senekonomie bruligas mil kaj mil tunojn da karbo kaj mallerte ekspluatis la minejojn. Krome la kvanto de la surtera karbo suldas maksimume por unu centjaro. Do estas komprenebla, ke multaj homoj kun teruro imagas la momenton, kiam la lasta tuno da karbo ekbruligos. Poste venos la frosto, ekstarigos la vagonaroj, la fabrikoj ktp.

Sed la afero tamen ne estas tiel tragika! La scienco kaj tekniko jam havas bonegajn ilojn anstataŭantajn la ŝtonkarbon. Tiuj iloj — laŭ nia scio — estas: dinamoj movataj per akvo, petrol-, gas-, mazut-motoroj, benzinmotoroj, ekspansiaj motoroj, sunmotoroj, vento- kaj ondo-motoroj kaj radioaktivaj konstruaĵoj.

La aktivaj dinamoj precipe estas gravegaj por landoj, kiuj ne havas karbon sed havas sendependan industrion. Ĉi tie la statika energio de la moviĝanta aŭ ripozanta akvo ŝanĝiĝas je elektra energio. Multe pli moderne estas uzi elektrajn maŝinojn anstataŭ karbomaŝinoj. Ĉi tie ne estas cindro, fajro, fulgo, danĝeraj fajreroj, peza hejmatmaterialo; elektra fluo estas facile kondukibla per simplaj fadenoj. Krome ni povas esti konvinkitaj, ke en estonteco eĉ la fadenoj fariĝos superfluaj, se la sendefenda kondukado de la elektra fluo pliboniĝos.

Jam nun oni vigne uzadas la aktivajn turbinojn. Ni nur citu la Niagara-akvofalegon en Usono.

motorojn, kies ĝenerala principo estas: grandaj konveksaj speguloj, kiuj kolektas la sunradiojn kaj projektas ilin sur fulgitan kaldronon, kie akvo bolas. Tial oni fulgas la kuprajn kaldronojn, ĉar la nigra koloro absorbas la varmon. Ni imagu, ke oni kolektos la sunenergien falantan sur la Sahara-dezertegon, oni transformas ĝin je elektra fluo — ĉu ne la tuta tero povus esti provizata per hejmatiero kaj lumigado? La transformado povas okazi per termikaj elementoj aŭ per la jam citita metodo, t. e. per movo de vapormaŝino, kiu movas la dinamon. Se plue ni imagas, ke la estontaj sunmotoroj kunigos kun la estontaj akvo-turbinoj, ne nur ili anstatauos la ŝtonkarbon, sed eĉ okazos grandega progreso sur la kampo de la tekniko, kaj la socia bonfarto plifavorigos; ĉar la ricevota elektra fluo estos gajnata preskaŭ senpage.

Krome ni povas utiligi la konstantan marondigon, alfluon, defluon ktp.

Sed eble la plej triumfontaj estos la konstruaĵoj sur la bazo de la nova sciencofako, la radioaktivismo. Ne estas eble ĉi-loke longe paroladi pri la radio-aktivismo, nur ni notu la sekvantajn punktojn: Unu gramo da urano produktas po horo 7.2 · 10⁵ kaloriojn. Ĉe la disigo de unu gramo da radiumo produktiĝas varmo de 21 000 000 da ka kalorioj. Nun ni ankoraŭ ne estas kapablaj utiligi ĵenan energifonton, sed la estonteco povos alporti la solvon de ĉiuj sekretoj de l' estanteco.

Ni do dormu frankville kaj ne timu pro la konsumiĝo de la karbo, ĉar ni havas por ekspluati pli gravajn kaj potencajn energiofontojn ol la ŝtonkarbo!

Originate verkis:
IOZEPFO MAJOR, Budapest.

Scienco.

NOVA KOMPRENO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO. (6-a daŭrigo.)

(PRES-ERARO. Bonvolu legi en n-ro 14. dua paĝo, dua kolono, linio 46 de supre: „acide“ anstataŭ „alacide“.)

La necerta de la nocioj paralizo kaj morto estas pli grandigitaj per laŭokazaj malkovroj igantaj konsilinde, paroli ĉi sole pri zonoj, ne pri limoj akraj. La plej surprizantajn korektaĵojn de malnovaj pririgardoj fiurilate alportis eksperimentoj pri la transviva koro. Post kiam jam de jardekoj oni montris unuatenpe per testuda kaj rana koroj, tiam per varmsangulaj koroj post-mortan aŭtomatecon, ĉirkaŭ la mezo de la naŭa jardeko, kelkuj eksploris ekprovis la izolitan homo-koron. Tiel ekz. *Hermann Dürck* en la patologia anatomio en Munhen sciis, helpe de simpla izotona kuirsalsolvaĵo, al kio oni devas atribui valoron, ĉar ankaŭ hodiaŭ la opinio estas disvastigita, ke al la fluidaĵo tra la koro fluanta oni devas aliksi nutradan solvaĵon laŭ *Locke* kaj krome oksigenon. Por plilongigi la aktivecon tio utilis, sed la propra agente estas la salsolvaĵo. En la literaturo la izolita homa koro balanta unufoje estas enkondukita 1902 de *Kuliabko*; reale pato-fiziologia signifon la eksperimento je la homa koro nur ricevis en la lastaj jaroj per la patologo *A. Cesaris-Demel*, kiu provis, kompari la laborefikojn de la unuola koro post la morto kun tiuj dum la vivo de la posedanto.

El liaj multnombraj artikoloj pri la temo estas plej interesaj la „Etudes sur le coeur isolé“ (studoj pri la koro izolita) proponitaj en oktobro 1911 al la Turina Kongreso de Patologoj. Jen li akcentis la faktojn, kiuj devis elvoki la miregon de ĉiu fiziologiisto kaj patologiisto, kaj kiuj kontraŭstaris ĉiun klarigon, se oni ne decidigas akcepti senkondiĉe la elektrogenetanecon de la salhidrato en la organismo kaj laŭ tio la doktrinon de *Hirsh* pri aktiveco elektro-hemia. Mi ne opinias la konstataĵojn, ke la koroj izolitaj de junaj fortuloj sin montras pli funkcikapablaj ol la koroj de maljunaj malfortuloj, jen memkompreneble. Sed kio komence devas miregigi, estas la konstato de la Pisana esploristo, ke en kelke da kazoj koroj, ŝajne malfortaj aŭ malstreĉitaj laŭ la mal-sanhistorio, montris surprizantan laborkapablon en la postmorta eksperimento.

Tiun ĉi timigan fenomenon oni povas interpreti nur tiel, ke la koroj koncarnataj post la morto de liaj posedantoj venis en pli bonajn ĉirkonstancojn, ke ili finfoje ĉe la bezona izotona kaj rapideco estas ĉirkaŭgargarataj per elektrogeneta medio konforma al lia heredita strukturo. La sama koro, kiu dumvive aŭdigis la konatajn anemiatajn bruojn kaj sentigis malprofundan, neregularan pulson, nun funkcias post longa turmentplena ekzistado, liberigita de la akcidentoj kaj malpurigoj de aĉa cirkulacio, spirante kiel sana junulo. Kia ironio de la sorto, sed kia triumfo ankaŭ por la potenco de la elektrolito!

Al tiu-ĉi kunteksto apartenas ankaŭ la mirindaj sukcesoj de la salsolvaj-infuzoj kiel sesa pruvo por la *Hirsh*'a tezo. Nur sur empiria vojo oni jam antaŭ 80 jaroj ekkomprenis, ke la fieldirita fiziologia kuirsalsolvaĵo estas ne sole ne malutila, sed eĉ utilis por kompensi deirintan fluidaĵon de la koro.

Iom post iom tiuj infuzoj fariĝis tute neanstataŭigebla helpilo por ripari sangon malbonan kaj por la patologia akva perdo, pri kio oni ne

konskligis la elektran momenton. Ĉe holero kaj disenterioj, ĉe intest-kataroj, tifo kun akvosimila defeko, asfiksio de la novnaskiĝintoj (enŝprucigo en la umbilikon), diabeto komo, ĉe egaj sang-perdoj ĉiuspacaj: lezoj, menstruacio, puerperio, naskolito, tifo, hemofilio, sangado el la nazo, hemorojdoj; ĉe malpligo de sangopremo kaj cirkulaciaj perturbedoj, kiel kompensaĵo por perditaj sango, ĉe pletro (trombulsangeco) kaj sang-ellaso, ĉe malforteco de koro kaj dispneo (tro malmulte da spiro), ĉe akuta anemio, ĉe diversaj statoj de sango-venenado, ĉe peritoneito kaj urinaj malsanoj, ĉe la dek aŭ pli specoj de kolikoj kaj ĉe profilaksio kontraŭ kolapso, ekz. ĥloroform-kolapso ktp.

Se oni foje vidis, ke homo, kiu sekve de abunda sangopremo senule, kun neaŭdebla korbato kaj tute pala kuŝas, per infuzo de unu litro da korpovarma fiziologia kuirsalsolvaĵo en la rektumon, post kelkaj minutoj malfermas la okulojn, ekkoloriĝas kaj tre baldaŭ refreŝiĝas, oni jam ne dubos pri la viviganta efiko de tiu ĉi elektrolito kaj ekvidos, ke jen sole elektraj fortoj, la vivon alkondukantaj, ĉar en la salsolvaĵo aliaj fortoj ne estas entenataj. La kontraŭparolo, ke estas nur la plenigo de la angioj per akvo, prave ne povas esti starigata. Ĉar montrigis, ke nura akva inŝprucigado nepre ne havas la efikon de la salsolvaĵo.

Jen ankaŭ la eksperimentoj je sensangigitaj bestoj, pri kio *Hirsh* skribas tiel:

„El malvarmeta rano, kiun konsideri varmomaŝino estus preskaŭ frivole, la lasta guto de la sango estas subfirita. Senmove kuŝas la mizerulo, ĉiuj vivsimptomoj malaperiĝis. Nun anstataŭ la sango, oni influigas al la malplena cirkulacia sistemo ĉirkaŭ 1/2-an kuirsalsolvaĵon, kiu eĉ ne bezonas esti varmigata, — kaj jen, post kelke da tempo la ŝajne mortinto ree moviĝas, ĝi saltetas kaj saltas kaj buŝekspitas muŝojn. La miraklo ĝis nun restis neklarigata, komprenebla ĝi nur fariĝis laŭ mia konjekto apogita sur la kredo, ke ne la kvanto kaj varmo de la infuzo, sed ties elektrogenetaĵo eĉ funkciiĝis denove la ĉelstato de la eta malvarmsangulo.“

(Daŭrigota.)

Lernejo.

NEUKÖLLN (Germ.). Esperanto tie ĉi bone progresas. Nia grupo malfermos la 2. febr. novan kurson. S-ro instruisto Wittbrodt instruas en sia polpol-lernejo 92 knabojn en Esp. kaj en alia kurso 25. Instruisto Ehrke instruas 62 knabojn. S-ano Preibich instruas Esp. ĉe la militvunditoj. La 1. febr. s-ro Wittbrodt malfermos kurson ĉe la popol-alternejo en Friedrichshagen-Berlin. S-ano d-ro Wirsch tie parolos pri Esp. la 27. jan.

S-ro Wilh. Wittbrodt, instruisto, Neukölln (Germ.), Anzengruber Str. 5, deziras ricevi adresojn de ge- knaboj el la tuta mondo kiel korespondantoj por siaj lernantoj.

Gazetaro.

FLENSBURGER NORDDEUTSCHE ZEITUNG. Flensburg (Germ.). 14. jan. La n-ro enhavas tradukon de Letero el Stiro (de J. Mader) el IES.

LES NOLIVELLES. Algier. 31. dec. Enhavas franclingve la raporton pri la malsat- antaj hungaraj infanoj el IES.

NOWE TORY. Bydgoszcz-Bromberg. N-ro 5. Kun diversaj notoj pri Esp. aŭ per Esp. ricevitaj.

kaj el sub ĝi scivole observante la alvenintojn. Laŭ kostumo li estis vera „sinjoro“, kaj se ĉi tio okazus hejme, Dima nepre profunde salutis lin kaj dirus:

„Bonvolu pardoni! Eble, la hebreo eraris, al- veniginte nin ĉi tien?“

Ĉiokaze la Loziŝcanoj opiniis vidu antaŭ si amerikan nobelon aŭ estron. Mr. Bork baldaŭ revenis per ŝraŭbforma ŝtupareto de supre el la ĉambro de sia filino, kien li jam forkondukis Anna'n, kaj tuj montris al la du amikoj lilon tute proksiman al la lito de tiu grandsinjoro.

„La lito,“ li diris, „kostos por vi du dolarojn semajne.“

„Aŭskultu, Mr. Bork,“ mufmuretis Dima, „ĉu ĝi estas ĝusta prezo?“

„He!“ ofendite respondis Bork: „Kion pli bonan vi povus havi por du dolaroj semajne? Eble vi pensas, ke ĉiu el vi devas pagi po du dolaroj? Ne, vi ambaŭ kune... Por tagmanĝo aparta pago.“

„Dio estu kun vi,“ respondis Dima ĉiam flustre, „se vi ne volas fari rabaton. Sed ĉu ne estas malagrabla al tiu sinjoro? Ni estas simpluloj...“

Bork anstataŭ respondado nur fajfis kaj diris, rigardante la amerikan nobelon kun nekaŝita malŝato:

„Ne, vi povas esti tute frankvilaj. Ĝi tute ne estas tio, kio al vi ŝajnas. Ĉe ni regas libereco: ĉiuj estas egalaj, kiuj bone pagas. Kaj jen kion mi ankoraŭ diros al vi! Vi estas simpluloj, sed vin mi pli alte taksas, ĉar mi vidas: en la hejmo vi estis mastroj. Oni tiam vidas tuj. Sed tiun ĉarlatanon mi certe ne havus kiel loĝanton, se oni ne pagus por li el Tammany-Hall. Ĉu min koncarnas ĉi tio? Ĉiun semajnon mi akurate ricevas mian monon.“

AMERIKO, La rusa tagjurnalo RUSSKYJ GOLOS (Rusa Voĉo) komencis enmetadi lecionojn pri Esp.: n-ro 1281 jam enhavis unuan lecionon. S-ro A. Sčucki kunhelpas gvidi tiun ĉi fakon. — Litova almanako LIETUVIN DARBININKU KALENDARIIUS por jaro 1921 enhavas artikolon pri Esperanto; ĝi kostas 25 cendojn. Adreso: 244, W. Broadway, Boston, Mass.

Komerco.

Moda Ekspozicio dum la Printempa Foiro de Frankfurt.

Kiel oni komunikas al ni, la foir-oficejo preparas grandmezuran modan ekspozicion dum la foiro. La ekspozicio donos unufoje dum la venonta printempa foiro (10.—16. aprilo 1921) al la modon kreantaj industrioj okazon por konigi siajn kreaĵojn al granda nombro de en- kaj eksterlandaj interesuloj. Informojn donas la foir-oficejo.

Internacio Katolika.

Nova venko.

La Internacia Katolika (Ika), fondita dum la Internacia Katolika Kongreso en Hag, aŭgusto 1920, benita de Lia Papa Moŝto, kun grandega sukceso uzadas Esperanton kiel sian oficialan lingvon internacian. En pli ol 20 ŝtatoj Ika havas naciajn direktorojn, en aliaj reprezentantojn. La tuta internacia organiza kaj interkomunika laboro fariĝas nur en Esperanto. Ne mankas tendencoj, kiuj volas forigi nian helplingvon el la internacia katolika movado; honora devo por ĉiuj samkred- anoj estas tuj almembrigi al Ika. Aŭguloj kaj demandojn oni sendu al Ika (Internacia Katolika Agada Centrejo), Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo.

Propaganda sekcio de Ika: Kaspar Mayr, sekretario.

Universala Internacia Katolika Kongreso.

(7.-11. aŭgusto 1921 en Graz, Aŭstrujo.)

Tuj post la fino de la Universala Kongreso en Praha okazos en Graz la Internacia Katolika Kongreso (7.-11. aŭgusto 1921). Krom la ĝenerala problemo de la nuntempa internacia agado pritraktota dum la ĝenerala parto de la kongreso oni intencas aranĝi specialajn konferencojn por la diversaj fakoj de la vivo katolika, ekz. por la junula, studanta, virina, laborista, porpaca, esperanta kip. movado. La organiza kongreskomitato invitas kore ĉiujn samkredanojn al multmembra partoprenado. Oni sendu aliojn kaj demandojn al la Organiza Kongres-Komitato, Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo.

La propaganda kongreskomitato: Kaspar Mayr, sekretario.

Internacia Katolika Porpaca Kongreso.

(7.-11. aŭgusto 1921 en Graz, Aŭstrujo.)

Okaze de la Universala Kongreso Katolika en Graz, aranĝata per la Internacio Katolika (Ika), 7.-11. aŭgusto 1921, okazos Internacia Katolika Porpaca Kongreso por pritrakti la problemon kaj tutmondan organizon de la internacia katolika porpaca movado. La prepara komitato starigis tuj internacian komitaton por montri la absolutan politikan neŭtralecon kaj invitis ĉiujn gemojn de la katolika porpaca movado al bonvola partoprenado. Ĉiujn informojn donas la Organiza Kongres-Komitato, Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo.

Por la prepara komitato de la kongreso: Sekretario de Mondpacigo Cefsekretario de Ika: Kruco Blanka: Kaspar Mayr. D-ro M. J. Meßger.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (12-a daŭrigo.)

Tra la malfermita fenestro vidigis la aera relvojo, per kiu ili ĵus alvenis. Nun re ekaperis malproksime la ronda ŝildo de lokomotivo, ĉiam pli kaj pli kreskante. La Loziŝcanoj ĝin sekvis kun iom da timo. La grincado kaj bruado alproksimiĝis ĉiam pli, la vagonaro ŝajne estis en- ruligonta en la ĉambron. Sed en la sama momento akra aerondo kvazaŭ frapis la fenestron, kaj tute apude, de la kontraŭa flanko, preterflugis muro kun fenestroj. Tio estis alia vagonaro; tra la fenestroj en la daŭro de unu sekundo vidigis kapoj, ĉapeloj, vizagoj, interalie kelkaj nigraj kiel fulgoj.

Momenton poste ĉio malaperis malantaŭ la angulo, kaj la vagonaro jam flugis pluen, ĉiam malpligrandigante, dum la unua vagonaro male fariĝis pli kaj pli granda kaj post momento ankaŭ preterflugis antaŭ la fenestroj. Kolono da fumo kaj vapore, kvazaŭ disvolviganta rubando, frapis la fenestron, kelkaj flokoj penetris eĉ en la ĉambron.

„Ĉiu animo laŭdu Dion!“ diris Mateo, timigite farante krucosignon, kaj ne pli frue, ol kiam ambaŭ vagonaroj foriĝis, li komencis pli bone ĉion rigard- esplori en la nova loko.

En la ĉambro troviĝis deko da litoj, sed el ĉiuj loĝantoj estis hejme nur unu sinjoro, kies rangon la Loziŝcanoj ne povis difini. Li surhavis sinjorajn vestojn, kiel Bork, helan kvadratan pantalonon, grandajn kaj pezajn laĉtajn ŝuojn, amelitan ĉemizon kaj helkoloran veŝton. Li kuŝis sur lito, duone kovrinte la vizagon per gazetfolio

Dima penadis kompreni ĉion vidatan en la nova loko kaj tial, pripreninte la ne tute kompren- eblajn parolojn de Bork, li jetis flankan rigardon sur la kuŝantan sinjoron kaj diris:

„Se mi bone komprenis vin diron, Mr. Bork, li ne estas sinjoro, sed sentaŭgulo el la speco de tiaj, kiaj ĉe ni dum foiregoj... Ĉapelon li sur- havas kaj blankan ĉemizon kaj kravatton... sed povas okazi, ke oni sian monujon ne trovos?“ Bork ekridetis.

„He, vi bone scias traŭ per la fingro en la ĉielon!“ li diris, karesante sian barbon. „Ne, pri via monujo vi ne timu! Ĉi tio ne estas lia profesio. Mi nur diras, ke ĉiu homo devas serĉi solidan kaj honestan okupon. Sed tiun, kiu vendas sian voĉon, se ĝi eĉ estas nefalsita voĉo, — tiun, kiu vendas sian voĉon al Tammany-Hall por mono, tiun mi ne opinias homo fidinda.“

Kaj li aldiris kun ekĝemo:

„Mi ankaŭ havis ĉi tie solidan negocon. Nu, kion fari? Ĉio malsukcesis, restas ĉi tiu loĝejo ĝis kiam finiĝos la kontraktempo. Tial mi nun estas devigata doni rifuĝejon al ĉiuspacaj kanaljoj...“

Dima ne komprenis, kiamaniere estas eble vendi sian voĉon, eĉ ne falsitan, kaj kiu povas bezoni la voĉon, sed ĉar al li estis ne tute agrable, ke li jam unufojon „trafis per la fingro en la ĉielon“, li ŝajnis, ke li ĉion bone komprenas kaj sin turnis al sia amiko:

„Bone! Se tiel estas, Mateo, metu la paketon ĉi tien. Ĉu ne vere? Nia mono estas mono ne- falsita. Ĉu ne ekzistas ĉi tie ankaŭ libereco? Al la diablo!“

13) Rusa esprimo: malprave diveni.

(Daŭrigota.)

Cent.

Nombroj parolas. Precipe jubileaj nombroj. Al Germana Esp. Asocio ĵus aniĝis la reviviginta grupo Köln-Kalk kiel centa grupo. Oni povas gratuli al GEA kaj al la fervoruloj en Köln-Kalk por tiu bela sukceso, kaj oni rajtas esperi, ke tiu jubileo estas bona antaŭsigno por la plua progreso de Esperanto en Germanujo kaj por la sukceso de la nunjara Kongreso de Germanaj Esperantistoj, kiu okazos je Pentekosto en Essen.

Ni deziras al GEA baldaŭan atingon de la dua cento.

Grava internacia Konferenco de Esp. Gvidantoj en Köln?

Kiel ni atidas, estas intencate aranĝi, eble je 10. aprilo, konferencon de Esp. gvidantoj en Köln, ĉe kiu partoprenos d-ro Privat, d-ro Stettler, s-ino Cense, s-roj Chavet, Poncet, Badge, d-ro Arnhold kaj aliaj konataj esperantistoj.

Je la sama tago estas okazonta la dua postmilita kongreso de Rejnlanda-Vestfalia Esp. Ligo (Revelo).

La Germana Esp. Kongreso 1921 en Essen kaj la Agado de la Revelo.

La nunjara Kongreso de Germanaj Esperantistoj okazos Pentekoste en la mondkonata industria urbo Essen. Samtempe estos Kongreso de Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj. La preparo jam faritaj estas multe promesaj. Oni atendas ankaŭ la viziton de samideanoj el najbaraj landoj kun alta valuto (Holando, Belgio); ĉar ili vivos tie ĉi pli malkare ol en sia propra lando.

La 13. jan. okazis konferenco inter la trezoriŝto de GEA, d-ro Arnhold, la estraro de Revelo kaj la gvidantoj de la Essen'a Esp. movado, por klarigi diversajn demandojn rilate la kongreson.

Nun estas en multaj lokoj de la Revela teritorio vigla movado, en ĉ. 70 urboj kaj vilaĝoj de Rejnlando kaj Vestfalio ekzistas esperantistoj kaj grupoj. La Revela estraro laboras modele, senlace, kaj ĝia ekzemplo bone efikas sur la grupojn kaj izolulojn. Jam la fruktoj de tiu intensa laboro ekmanurigas. Ankaŭ la venonta kongreso de Essen antaŭenjetas siajn radiojn kaj jam nun tre akcelas nian aferon; ĉar oni povas aranĝi kursojn kun la celo, prepari la kursanojn por vizito al la kongreso, tie! instigante ilin je plej fervora lernemo. Bedaŭrinde ne ĉiuj grupoj kaj esperantistoj komprenas la neceson de firma organizacio. Ne ĉiuj apogas la laboregon de Revelo sed restas ekstere. Estus dezirinde, ke ĉiuj aliĝus. Ju pli ni estas multaj, ju pli firme ni estas organizitaj, des pli ni estas fortaj.

Internacia Koncerto en Budapeŝto.

Dum la POSTKONGRESO ESPERANTISTA en Budapeŝto post la dektria mondkongreso en Praha, en aŭgusto 1921, oni intencas aranĝi grandan koncerton, kies ĉia numero estu prezentata de alinacia esperantistoj! La kongres-komitato jam nun alvokas ĉiujn partoprenantojn, ke ili sciigu, je kia numero ili deziras partopreni ĉe la koncerto. Oni povas anonci sin je la muziknumero el sia nacia muziko, por kantado de nacia kanto, por deklamo de nacia poemo (nature en Esperanto), grupetoj povas sin anonci ludi teatraĵeton, ktp. Ankaŭ artistoj povas partopreni! La koncerto espereble fariĝos rimarkinda, unika, interese festo por la mondo! Por povi kompletigi la programon, rapidu do anonci vin, ĉar de unu nacio oni ne povas akcepti multajn prezentantojn! Neroneatoj kunsendu ĵan aprobon de fiera socio, lernejo ktp. pri kapableco partopreni! La koncerton aranĝas hungara aktoro, konata esperantista poeto: Julio de Baghy.

Adreso: (provizore al Hungara Esperanto Servo) P. Balkányi, Budapeŝto, VI., Hajos utca 15-II-2.

Por tritaga restado pro la granda valut-diferenco certe sufiĉos el bonvalutaj landoj dek ŝilingoj, dek sv. frankoj, dek hol. guldenoj, dek skandinav. kronoj, tri dolaroj ktp.! Festoj, ekskursoj, prezentadoj, ŝipveturado ktp. estas planataj! Anoncu tiu vian partoprenon. Aliĝo tri monunuoj el via lando! Se eble, helpu per mondonaco la kongreskason!

Organiza Komitato de la Esperantista Postkongreso Budapeŝto 1921.
Sekretario:

A. Laquer, VII, Király u. 57. II, Budapeŝto (Hungario).

Manko de tempo

devigas la eldonanton de ET prokrasti ĉiujn ne nepre urgajn respondojn ĝis februaro. Tial li denove petas ĉiujn demandintojn havi paciencon ankorau kelkajn semajnojn.

Ripete ni scigas, ke ET n-roj 1-6 estas elĉerpitaj; nun ankaŭ ekmankas n-roj 13 kaj 14.

Societa Vivo.

BYDGOSZCZ (Polio). La de s-ano prof. Kronenberg starigita Esperanto-foko en la urba biblioteko entenas jam pli ol ducent diversajn librojn de Esp.-literaturo. En multaj fenestroj de l' urbvendejoj estas videblaj Esperantaj, lernolibroj en pola kaj germana lingvoj ktp. S-ano ekl. konsilanto Becker gvidas kurson ĉe la katolika unuigo „Dzieci Marii" (infanoj de Maria) kun bona sukceso. Partoprenas 40 personoj.

GYÖR (Hungario). La 4. jan. estis la edziga festo de malnovaj s-anoj Kardos kaj Edinjo Bureliĉ en la fiera episkopa preĝejo. La ceremonion faris prelato Giesswein havis tre belan kaj interesan esperantlingvan parolon al la nova paro. Do, ĝi estis tute Esp. edzigeŝto.

HORREM apud Köln (Rejnlando, Germanio). En tiu ĉi loko de 5500 enloĝantoj s-ro Jung komencis kurson kun 55 partoprenantoj el la loko Horrem, Ichendorf, Quadraht kaj Kerpen.

KREFELD (Rejnlando, Germanio). La malnovaj esperantistoj rekolektiĝis, grupo restariĝis kaj aliĝis al Revelo kaj al GEA. Kursojn gvidas la 70-jara prezidanto s-ano R. Sanders. Propagandan fakon prilaboras s-ano M. Roher. Kunveno ĉiujarde je 8 h. en rest. Gerhard Büns jr., Königstr. 49.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj gazetoj kun aldonado de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo" estas permesata.)

LETERO EL POLIO.

Bromberg-Bydgoszcz, januaro 1921.

Unifikacio!*) Jen afero, kiun oni lastatempe priskribas en la tutpola gazetaro, kaj pri kiu temo eksterlandano nenion aŭ tre malmulte scias.

Tuta Polio konsistas el tri diversaj partoj, nome la iame rusa parto, nomata Kongres-Polio, kun la pola ĉefurbo Varsovio, la aŭstria parto, nomata Galicio aŭ Malgrand-Polio, kaj la prusa teritorio kun la nomo Grand-Polio.

Tiuj ĉi tri partoj nun estas kunfandotaj. Je la du unuaj la problemoj estas almenaŭ solvitaj. La plej grandajn malfacilaĵojn kaŭzas la laste nomita. Tie ĉi, kvankam Grand-Polio jam de unu jaro estas liberigita de l' prusa regno, ekzistas ankoraŭ, krom la pola registaro en Varsovio, dua en Grand-Polio en Poznan. La prezoj de l' komercaĵoj, vivajoj ktp. estas aŭ almenaŭ estis tie ĉi tute malsimilaj al tiuj en la du aliaj partoj de Polio. Ezemple ni Grand-Polianoj pagis por unu trifunta pano 15 mk., la Kongres-Polianoj pagis por la sama kvanto 60 ĝis 80 mk. Nature ankaŭ la salajroj estas tute malsimilaj. Tiun ĉi mallegecon en unu pola ŝtato volas nun la pola parlamento forigi.

Dum la diskuto de l' pola parlamento oni priparolis du vojojn, kiuj estas sekvoitaj: egaligo de l' prezoj por tuta Polio aŭ provizora memregado de nia regiono kun aparta valuto kaj severe gardota limo. Kvankam oni ne konas la definitivajn decidon, tamen ŝajnas, ke estos elektata la unua vojo, nome egaligo de l' prezoj kaj tuj kunfando de ambaŭ partoj. Laŭ ekonomia vidpunkto la afero ŝajnas ankaŭ realigita, ĉar la prezoj en Grand-Polio altiĝas de tago al tago kaj egalas preskaŭ tiujn de Kongres-Polio.

Laŭ lastaj gazetkomunikoj estas ankaŭ kunfandotaj la instru-aferoj, kaj tio en plej proksimaj tagoj. Do ni staras antaŭ la fakto de unuigo de l' tri diversaj partoj de Polio. Ĉu tiu ĉi rapida unuigo alportos benon? Ni atendu! *Les temps changent et nous avec eux!* (La tempoj ŝanĝiĝas, kaj ni kun ili!)

FRANCISKO PRENGEL.

*) Unuigo aŭ kunfando.

Moka.

Moka komencas nun efike labori por unuigi la tutmondan katolikan gejunularon. Por tiu celo ĝi starigas delegitojn en ĉiuj pli granda urbo kaj aranĝas ĉiujare internaciajn katolikajn junulajn kongresojn. La venonta estos en Graz, Stirio, aŭgusto 1921. Ankaŭ la internacia leterŝanĝado inter katolikaj gejunuloj jam bone funkcias. Moka petas nun ĉiujn katolikajn junulojn, kiuj estas emaj, preni sur sin la oficon de delegito por sia urbo ktp. sciigi al la centroj la adreson.

Pli detalajn informojn oni postulu de la centroj. Mondjunularo Katolika (Moka) Graz (Stirio) Karmeliterplatz 5
Hanns Sapp 1, Sekretario.

Ne vort-serĉoj sed veraj etimologioj

Diri aDlaŭ estas rekomerti iun al Dio. EGA estas la sono de la meGafono. ETA estas la LUMO de la aLUM-ETO. Aŭtomobiloj estas utiĵaj loj. En la LAKTuko estas LAKTA suko. La LAMPiro iras kun LAMPO. Nobleco estas vera nobleco. Ne amuzejo estas MUZEo sed MUZ-Ejo. Ne ĉiu Diveno venas de la Dloj. Ne ĉiu LEGendo estas LEGinda. Ne ĉiu nomita ANĜEL-ino agas ANĜEL-ine. La TREMolo estas TREMulo. La plej ofta monoMANio estas MANio pri MONo (monomanio estas manio pri nur unu ideo).

(Charles O. Stuart-Menteth, London.)

El serio „Parodioj“.

La Vojo . . . ekskurso.

Al Oskaro Berman, la senlace kursgvidanto, dediĉita.

Post longa vagado vidigas la celo,
Al kiu ekskurse ni iras;
Kaj malgraŭ la belo de nia verdstelo
Ni ankaŭ naturon admiras.
Kaj nin ne fimigas la noktavenenturoj,
Nek kisoj varmegaj, nek amopezulaj;
Ĉar bela kaj bona kaj ĉarma sen fino
Nun estas fraŭlin' kaj virino.

Nur arde, kuraĝe kaj ne atendante
Ni kisu buŝeton la inan;
Eĉ homo mallerta, konstante petante,
Moligas la koron virinan.
Insisto, obstino kaj senpacienco
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni tuj, senprokraste, sen multa laboro
Akirus ŝlosilojn de l' koro.

Ni kisas, ni kisas, neniam laciĝas,
Pri viv' kaj juneco pensante.
Cent kisoj aŭdiĝas, mil kisoj aŭdiĝas,
Ni kisas kaj kisas konstante,
„Ho, ĉesu!“ ekskurso-gvidanto admonas. —
„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ fraŭlinoj resonas:
„Senfine vi kisu, ĉar poste ni ĝemos
Kaj plu Vin al koro ne premos.“

Se longa murmuro de nia gvidanto
Varmegajn la kisojn ĉesigas,
Ni aŭdas lin tiam kun rido kaj kanto
Kaj tamen tuj poste daŭrigas . . .
Ne ĉesu jam ludi la juna verdrondo,
Ĝin jam ne fimigos gvidanto, tutmondo:
Obsfine ĝi ludas kaj kisas, petolas
Kaj hejmen reveni ne volas.

Nur arde, kuraĝe kaj ne atendante
Ni kisu buŝeton la inan!
Eĉ homo mallerta, konstante petante,
Moligas la koron virinan.
Insisto, obstino kaj senpacienco
Jen estas devizoj, per kies potenco
Ni tuj, senprokraste, sen multa laboro
Akirus la korojn en glorio!

JOŠO.

Lingvaj Notoj.

De Walter Lippmann.

1. Neĝusta partico.

En ET n-ro 12, pĝ. 1, kolono 1 oni trovas la frazon: „Tiu ĉi raporto estas legita en la lasta kunsido, okazinta la 11. nov. . . .“ Tio estas ne korekta, ĉar la raporto ne estas nun raporto legita, sed ĝi estis en tiu okazinta kunsido raporto legita. Do: „Tiu ĉi raporto estis legita . . .“

2. Jen kaj tien.

En ET n-ro 12, pĝ. 1, kolono 3 oni trovas la esprimon: „La ondoj ruliĝas jen kaj tien.“ Logike tio ne estas ĝusta. La ideo esprimenda estas: La ondoj ruliĝas alterne for de ni kaj reen al ni. Do oni povas diri: ili ruliĝas 1. for kaj reen, aŭ 2. tien kaj tien ĉi, aŭ eĉ 3. tien kaj reen. Ĉiuj ĉi adverboj montras direkton, al kiu la ondoj moviĝas. Kontraŭe „jen“ signifas: 1. (= franca voict, voilà) montron, atentigon, ke io estas antaŭ oni, ke ĝi ĉeestas, do havas sencon lokan, ne direktan; 2. nur en la esprimo jen . . . jen, ke iu ŝtato aŭ ago estas nuntempe ĉi kaj altempe alia, do havas sencon tempan, ne direktan.

El tio rezultas, ke oni ne povas uzi la direktan (akuzativan) adverbon „tien“ kaj la lokan (nominativan) adverbon „jen“ paralele kaj ligante ilin per „kaj“.

Kompreneblè estas ĝuste diri: jen tien (kaj) jen tien (ĉi), aŭ: jen for (kaj) jen reen, k. s., sed ne: jen kaj tien.

3. Tial ke.

Mi bone scias, ke la esprimo „tial ke“ havas analogojn en naturaj lingvoj, ke ĝi estas komprenebla kaj eĉ de d-ro Zamenhof uzita, do certe ne erara. Tamen la demando, ĉu ĝi estas preferata uzinda aŭ eĉ pli bona ol nia simpla samsignifa vorteto „ĉar“, devas esti neata laŭ mia opinio. 1. La vorto ĉar estas pli mallonga, do pli oportuna. Du diferencaj samsignifaj vortoj estas ĝenerale evitataj en Esperanto. Ili malplifaciligas la lingvon kaj donas nur la malgrandan utilon, ke oni povas alternigi la esprimojn. 2. La vorto „tial“ apartenas al la ĉefpropozicio, dum la vorto „ke“ ankondukas dependan propozicion konsekutivan.

Ekzemple en la frazo: „Tial ke estas certe, ke la antaŭa laborometodo estis iom malrapida, la Akademio aĉente ekzamenos la problemon pri . . .“ (ET n-ro 12, pĝ. 2, kol. 2, alineo 2) la vorto „tial“ anoncas tute izole kvazaŭ antaŭiposteno la ĉefpropozicion: „la Akademio . . . ekzamenos . . .“, kiu venas nur post du interaj propozicioj, unu dependa (ke estas certe) kaj unu subdependa (ke la . . . laborometodo . . .). Eble la franca (?) samideano verkinta tiun tekston ne sentas tiun disŝiritecon pro la simila rigidiginta „parce que“ (= pro tio ke) en sia lingvo. — Ĉu ne estus ĉiurilate pli bone, diri en tiu frazo simple: „ĉar estas certe, ke . . . (tial) la Akademio . . . ekzamenos . . .“?

Resume oni povas diri: „tial ke“ estas esprimo permesita, kelkfoje uzbla sed ĝenerale ne rekomendinda.

4. Kiu ajn.

La pronomoj komencigantaj per ki- estas 1. demandaj, 2. relativaj. Se oni aldonas al fia relativo la adverbajn ajn, ĝi per tio tute ne perdas sian relativan karakteron: La simpla ki-vorto estas simpla relativo, la kun-ajn-a-ki-vorto estas ĝeneraliga relativo. Ekzemple en la frazo „Kiu volas eniri, tiu devas frapi dufoje“ la vorto „kiu“ estas relativo rilatanta al la demonstrativo „tiu“. Tio ne ŝanĝigas, se la forlasebla demonstrativo mankas: „Kiu volas eniri, devas dufoje frapi“ kaj same ne, se oni aldonas ajn. „Kiu ajn volas eniri, (tiu) devas dufoje frapi“. Kiel relativaj la ki-vortoj kun ajn ĉiam devas enkonduki dependan frazon relativan. Tio nature ne validas koncerne la vortojn komencigantajn per ĉi-. Ili estas libere uzablaj substantivaj (ĉio, ĉiu), adjektivaj (ĉia, ĉiuj) aŭ adverboj (ĉie, ĉiam ktp.).

Tiu ĉi diferenco ne estas atentata de multaj esperantistoj, kiuj konfuzas kiu ajn, kio ajn, kie ajn ktp.: kun la vortoj ĉio, ĉie, ĉiu, ĉie ktp. Ili mal-konsideras, ke kiu ajn = ĉiu, kiu; kio ajn = ĉio, kio; kie ajn = ĉie, kie ktp. — Jen tia frazo: „Esperanto estas indiferenta ilo, kiu povas servi al kiu ajn celo...“ (ET n-ro 12, pg. 2, kol. 2, alineo 5). La verkinto pensis, ke „Esperanto povas servi al ĉiu celo, kiu ajn ĝi estas“ kaj tion li simple kunturnis. Se li estus dirinta: „Esperanto estas... ilo, kiu povas servi al ĉiu celo“ aŭ „... al ĉiuj celoj“ aŭ „... al (ĉiaj) celoj“, li estus espriminta sian penson pli korekte. — Eble oni povas, por pli akcenti la ĝeneralecon, ankaŭ diri: „... al ĉiu ajn celo“, sed certe ne: „... al kiu ajn celo“.

Sed ne nur anstataŭ „ĉiu“ oni trovas „kiu ajn“. Tiu ĉi formo ŝajne tiom plaĉas al iuj esperantistoj, ke ili uzas ĝin ankaŭ anstataŭ la nedifina pronomo „iu“, pensante ke kiu ajn = iu, kiu ajn li estas. Jen tia frazo: „Eksterlandaj ĝeesperantistoj (esperantistoj estus sufiĉinta!) intencantaj deponi en Praha monon, sendu pere de kiu ajn banko al la banko „Bohemia“ en Praha je la konto de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto... sian sumon en ĉeĥoslovaka valuto. (ET n-ro 12, pg. 3, kol. 1.) La senceno estas per(e) de iu banko, kiu ajn ĝi estas. Do la ĝusta traduko estas per(e) de iu banko, aŭ eble ankaŭ (kvankam d-ro Zamenhof ĉiam evitis ĉi tiun necesecon kunmeton) per(e) de iu ajn banko. — La ĉiuj frazo estas ankaŭ rimarkinda pro la nemodelstila reen-meto de la rekta komplemento (frazobjekto): sian sumon, post ses diversajn cirkonstancajn, esprimofn.

Parolejo.

49.

PRI NIA ORGANIZACIO.

RUBRIKO „PROPAGANDO“ EN „ESP. TRIUMF.“

Kun granda intereso mi legis la artikolon „Pli da praktika uzado de Esp.“ en n-ro 15 de ET. Estas vere, UEA havas malmulte da anoj; tamen oni povas kompreni, ke la plejmulto de la esperantistoj ne estas anoj de UEA.

Ĉiu ano de nia movado pagas kotizaĵon al la Esp. grupo de sia urbo, la grupo pagas por ĉiu membro al iu teritoria ligo kaj plue ankaŭ al la landa ligo. Ĉiu esperantisto legas minimume unu gazeton, kaj kiam li vizitas la kunvenon, oni petas de li donacon por propaganda kolekto. — Ĉar la mono, kiun enspezas la grupo, estas jam elpedita por presajtoj kaj por la kotizaĵoj de la diversaj landaj ligoj.

Jen estas la konata temo pri la troa organizado en Esperantujo.

Nia movado ja estas internacia movado, ĉu ne? Ni jam havas internacian organizaĵon, ni havas UEA. Jam ofte mi pripensis, kio povas esti la kaŭzo, ke la multaj landaj ligoj ne estas unuigitaj en unu internacia ligo, en UEA. Ĉu tio estas vere tiel malfacila? Ĉu ni esperantistoj ne estas samideanoj? Ĉu vere estas necese, ke ekzistas anglaj, francaj, germanaj, italiaj ktp. esperantistoj? Ni montru, ke Esperanto unuigas la homojn! Ni estu esperantistoj!

Mi ne dubas, ke iam, eble baldaŭ, venos la tempo, kiam ĉiuj esperantistoj de la tergloblo estos unuigitaj en unu granda unuigo. Ni devas tuj komenci la antaŭlaborojn, se ni volas atingi ĉi tiun celon. Estus ekzemple necese, ke ĉiu Esp. gazeto presigu en ĉiu numero la sekvantan frazon:

„Ĉiu esperantisto estu membro de UEA!
Unuigitaj ni atingos ĉion!“

Pardonu, s-ro redaktoro, se mi forŝelas vian tempon, mi havas ankoraŭ duan proponon, malgraŭ vi plendis pri manko da spaco en via gazeto. Vi certe faros grandan servon al nia movado, se vi havos rubrikon „Propagando“ en via gazeto. Ekzemple mi volas instigi la ĉi-tiean komercan ĉambiron akcepti oficiale Esperanton. Por tiu celo mi bezonas la adresojn de keikaj, pli bone ĉiuj, komercaj ĉambroj, precipe en eksterlando, kiuj korespondas en Esp. De GEA mi nur povis ricevi la adresojn de la germanaj popoli-direktejoj, en kiuj oni instruas Esp.; mi volonte transsendos ilin por tiu rubriko.

Estus ankaŭ bone, se vi atentigus en tiu rubriko pri la artikoloj en la sama numero, kiujn oni povas traduki kaj sendi al la naciaj gazetoj, ekz.: „Traduku kaj sendu al viaj gazetoj la sekvantajn artikolojn de la hodiaŭa numero: Esperanto kaj Ligo de Nacioj...“ ktp.

Vi certe bone scias, ke plej ofte nur la instigo mankas, ke multaj s-anoj faros tion.

Jen ankoraŭ unu noto por la rubriko Propagando: „Ĉu vi legis, ke en Finnlando kaj Estonio la estraro de la fervojoj permesis, ke la esperantistoj pendigu afiŝojn en ĉiuj stacidomoj? Tio instigu vian landan asocion, ke ĝi petu permeson fari la saman!“

Mi esperas, ke baldaŭ mi povos transsendi al vi proponojn por la rubriko „Propagando“ — en pli mallonga letero ol la hodiaŭa estas.

(E. Muscat, Nürnberg.)

Recenzojo.

LIBRO.

ESPERANTO, the League of Nations. Bona flugfolioeto anglolingva kun koncizaj informoj pri Esperanto. Be-dairinde eraro enstelis: UEA ne havas pli ol 10000, sed ankoraŭ ne 5000 membrojn. Trograndajn ni evitu. La folieto estas ricevebla ĉe „Save the Children Fund“, s-ro J. Bredajl, 5, Birchurst Road, Croydon (Angl.).

KAJEROJ de l' Frankfurta Foir-Oficejo, 1-a kajero. La foir-oficejo por la internaciaj foiroj de Frankfurt eldonas, krom „Frankfurter Messzeitung“ (Foir-Gazeto de F.), kies legantaro precipe en eksterlando ĉiam kreskas, germanlingvan kolekton „Kajeroj de la Frankfurta Foir-Oficejo“, kies unua kajero ĵus aperis. Ĝi enhavas paroladon de prof. d-ro Eberhard Gothein en Heidelberg pri „La komercaj foiroj kaj la rekonstruado de la germana ekonomio.“ La traktaĵo donas instruan super-figuradon super la evoluo de la germanaj foiroj de la frua mez-epoko ĝis nuntempe. La 1-a kajero, kiun aliaj baldaŭ sekvas, estas ricevebla kontraŭ 2 mk. de Foir-Oficejo Frankfurt a. M. Offenbach-Domo.

SAVE THE CHILDREN FUND. Flugfolio kun faksimilo el kajero de malsantata infano de Budapeŝt kaj kun alvoko al bonfaruloj.

GAZETOJ.

ARGENTINA ESPERANTISTO. Nov. dec. La unua numero, kiu nin atingis de tiu gazeto; ĝi estas preskaŭ tute en hispana lingvo. Interesa artikolo pri „Societa vivo en Zuriko (Zürich)“. En la Esp. teksto ni trovas la vorton „kurtigita“ anstataŭ „mallongigita“. Kvankam ni trovas tiun vorton bonega kaj oportuna, ni tamen ne povas rekomendi ĝin antaŭ pli ĝenerala disvastigo de Esperanto, ĉar tiuokaze ni devus ankaŭ permesi la uzadon de vortoj kiel dina (maldika), nidra (malalta), vajda (malproksima), mikra (malgranda) k. a. Ni atentu kun tiaj pliricoj de nia lingvo ĝis pli konvena tempo.

ESPERO KATOLIKA. Jan. Kun plejparte informo enhavo. Klarigoj pri Internacia Katolika Esp. Oficejo, Centra Ad-ministrisra Oficejo de Ika, Internacia Kat. Akcio Unuigo ktp. Propono de d-ro Metzger pri Ekonomia Internacio Katolika. — Aldono: Teknika Religia Vortaro, verkita de p-ro J. Bianchini. La unuaj 4 paĝoj vidigas multe da laboro kaj diligentecon.

THE BRITISH ESPERANTIST. Jan. Raportas, ke ĉ. 50 anglaj gazetoj en lasta tempo enhavis notojn aŭ artikolojn pri Esperanto. Ni ĝojas, ke la gazeto ree povas eliri monate anstataŭ dumonate.

ESPERANTIDA. Jan-febr. La gazeto ne aperis en novembro kaj decembro; en 1921 ĝi eliros dumonate kaj estos sendata senpage al la abonantoj; sed la eldonanto petas pri libervola donacoj.

Filatelistoj!

Ĉiuspecajn hungarajn poŝtmarkojn vendas, ankaŭ grandkvante kaj po folio. Proponojn kun prezo al
Akos Borsodi, Budapeŝt VI,
Révay utca 24. — (Hung.)

Por la duono

de la katalog-prezoj liveras ĉiujn hungarajn poŝtmarkojn

Hungara Esperanto-Servo, Budapeŝt VI,

Hajos-utca 15-11-2.

Filatelistoj!

Mi estas en rilato kun tre granda firmo de Polaj poŝtmarkoj. Belaj kolektoj. Maloftaj, antikvaj militaj markoj riceblaj kontraŭ antaŭpago aŭ ŝanĝo de ne uzitaj poŝtmarkoj ĉe

Ad. Oberrotman, Warszawa
Krak-Przedm. /10.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Ellersiek — Wissmann-Str. 46
(Germanio).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo

liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo,

eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiunmonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena

numero de la gazeto kontraŭ 1 respondukupono

aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Por 5 svis. frankoj

(60 mk.) aŭ egalvalofaj aliaj monbiletoj mi sendas al vi la du seriojn

pm. sovjetajn,

kiuj aperis dum la konsilantara respubliko en Budapeŝt (5 + 20 pm.),

por 8 sv. fk. (80 mk) la pm. hungarajn kun surpres-o „Konsilantar- respubliko“ kaj nova surpres-o per desegnaĵa spiko (26 pm.), laŭ peto ankaŭ aliajn hungarajn poŝtmarkojn.

Hungara Esperanto-Servo (Paulo Balkanyi)
Budapeŝt VI, Hajos-utca 15-11-2.

„Sinjoro Cadeo“

Epopeo de plej granda Pola poeto A. Mickiewicz, en majstra traduko de Antoni Grabowski.

La verko estas kvazaŭ profeta vizio de la nun reviviginta Polujo kaj prezentas grandiozan pentraĵon de la lando kaj ĝia loĝantaro.

500-paĝa, bele eldonita libro, grandforma, estas aĉetebla pere de la Varsovia Delegito de UEA

Ad. Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Varsovio.
Prezo 3 1/2 Flk. Svis. aŭ 14 Resp.-Kup.

Eksporto. Importo.

Komerc-Agentejo por Ĉeĥoslovakio

Mi deziras reprezenti ĉiuspecajn firmojn,

kaj mi liveras prograde:

lignon por la konstruado,

ĉiuspecajn vitron kaj vitrajn,

barelkranojn ktp.

Korespondado: ĉeĥa, esperanta, itala kaj germana.

Skribu al

Frant. Šupich en Červený Kostelec (Ĉeĥosl.)

Ĉiuspecaj poŝtkartoj,

Leter-Paperoj

kopiaj paperoj kaj inkorsbiloj estas malkare aĉeteblaj ĉe

Jozefo Major * Budapeŝt IX,
Remete str. 36-11-4.

Mi vendas prefere grandkvante. Al inform-petoj aldonu respond-elspezon.

Anoncetoj.

ACETO. Mi deziras aĉeti: 1. ET n-rojn 1 kaj 2; 2. la vortaron de Jürgensen kaj Pagnier (esp.-germane kaj germ.-esp.) ambaŭ redaktitaj de Zamenhof; 3. Engl. Deutsche Stilkunst, kaj Poehlmann, Geistessschule.

Anton Jüngling, Waldsassen (Bavario), Egererstrasse 49. ŜANĜO DE ADRESO. S-ro Ksaw. Alfus (Kraakow, Ped-zichow 22) scigas ĉiujn interesulojn pri ŝanĝo de sia adreso; ĝi estas: Ksaw. Alfus, Wied-Bank Zwiazek, Tarnov (Polujo). La ŝanĝo koncernas ankaŭ korespondadon kun „E.E.A.S.“

GARDEN-KULTURO. Mi dezirus korespondi pri ĝardenistaj lernejoj, kaj ĝarden-kulturo. Bonvolu sendi al mi filatralajn prospektojn kaj ĉiujn Esperantajn: broŝuroj, afiŝoj, bildkarto, gazetoj, libroj ktp. Jozefo Halasz, del. UEA, Targu-Mureŝ, Kŭleles S. u. 16, Rumanio.

ETIKISMO. Mi tre volonte konatiĝus kun la celado de liberreligia, etika kaj aliaj ekster-ekleziaj movadoj en la mondo (ekzemple: monismo kaj liberala komunismo en Germanio, labour-church kaj-ethical societies en Britio ktp.) Presaĵoj en angla, franca kaj germana lingvoj mi scias kompreni. Cetere mi ŝatas korespondi pri tiu temo. J. L. Brujin, Dagueerstraat 158, Haga (Nederlando).

TRIKOTAJOJ ĈIUSPECAJ. Mi volas ricevi ofertojn de eksterlandaj fabrikantoj speciale de fantaziaj artikoloj. I. D. Applebaum, 11 Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

A. Kurassov, Riesenkampstr. n-ro 29-1-3, Tallinn (Reval), Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Karlo Paszty, Budapeŝt VII, Erzebet körút 34, per poŝt- il. poŝtmarkoj.

Emilo Klammert, Budapeŝt VIII, Prater-u. 46-1-8, per poŝt- karto, pk. il., poŝtmarkoj, sigelmarkoj, gazetoj kaj leteroj.

Antal Haber (lernanto), Budapeŝt IX, Ernő-u. 12/19, per poŝt. il.

Kolomano Toth, Budapeŝt IX, Gyep-u. 11-1-19, per poŝt- karto il. kaj poŝtmarkoj.

Johano Tomau (lernanto), Budapeŝt IX, Gat-utca 25-1/8, per poŝtkartoj il. kaj leteroj, precipe pri matematiko kaj socio- logio.

S-ano Carl Kueper, Düsseldorf 3 (Germanio), Graf Adolf- Str. 11, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun Usono, Japanio kaj Ĉinio, por interŝanĝi poŝtkartojn, Esperantaĵojn kaj memorajn; ĉiam respondos.

Emeriko Strasser, Budapeŝt IX, Remete u. 36-11-8, deziras korespondi per poŝtkartoj il., leteroj, poŝtkarto, gazetoj naĉlingvaj kaj Esperantaj, silosiloj. Tuj respondos.

Walter Lippmann, Zwenkau (Saksio), Ritterstr. 11, deziras interŝanĝi done aŭ vende: ĉiujn librojn, ankaŭ Esper- antajn, poŝt. il., ilust. poŝtkartojn novajn kaj uzitajn, gazetojn, germ. kaj Esp.; riceve: poŝtmarkojn (prefere malnovajn), Esp. gazetojn.

Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas.

Walter Dick, Plauen 1. V. (Germ.), Forststrasse 84.

S-ro Jorma E. Parianen, kiu antaŭe loĝis en Uusikaupunki, estas transloĝinta al Tampere, kaj deziras korespon- dadi per il. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj. La novaj kaj malnovaj korespondantoj notu do bonvole lian novan adreson.

S-ano Francisco Prengel, Bydgoszcz (Poljo), Podgorze 17, interŝanĝas Esp. gazetojn, poŝtmarkojn, gvidlibrojn. Sam- ideanoj el ĉiuj landoj sendu priskribon de via literaturo, muziko ktp. (rakontojn, novelojn). Mi tradukos ilin por la ĉi tiea pola kaj germana gazetaro. Servu tiamaniere al via lando kaj nia kara lingvo!